

Friedrich Schiller,

## Al la ĝojo

*tradukita de Joachim Gießner*

Ĝojo! Vi fajrero dia,  
d'Elize' filino vi!  
En sanktej' benita via  
arde vin omaĝas ni.  
Sorĉe ligas vi beate,  
se disigis malraci'.  
Hom' al hom' estiĝas frate,  
kie milde regas vi.

.....  
.....  
.....  
.....  
.....

Kiu de amik' fidela  
nomas sin amik' de li,  
kiu kun edzin' anĝela  
vivas, jubiladu pli,  
eĉ, se nur al unu koro  
ie ligas lin inklin'.  
Sed aliaj ja kun ploro  
el la lig' forŝtelu sin.

...

Friedrich Schiller,

## Al la ĝojo

*tradukita de Kálmán Kalocsay*

Ĝoj'! Fajrero belradia!  
Elizea di-filin'!  
fajrebrie ni al via  
templo iras, preĝi vin.  
Ĉesu, de vi sorĉligate  
de l' rigora mod' la ŝir',  
ĉiuj homoj sentas frate,  
se vi ŝirmas perflugil'.

Ĥoro:  
Jen brakumoj al milmiloj,  
Jen ĉi kis' al tuta mond'!  
Fratoj! super stela rond'  
loĝas patro por ni, filoj!

Se la granda ĵet' bontrafis  
kaj amikon gajnis vi,  
se virina am' vin ravis:  
Vin enmiksi kun ĝojkri'!  
Jes, se eĉ nur unu koro  
estas via en la mond'!  
Kaj se ne – do vin kun ploro  
ŝtelu for el nia mond'.

...

.....  
 .....  
 .....  
 .....  
 .....

.....  
 .....  
 .....  
 .....  
 .....  
 .....

.....  
 .....  
 .....  
 .....

Ĝojo estas la risorto  
 en eterna la natur'.  
 Ĝojo jen per sia forto  
 movas l'universon nur.  
 Florojn el burĝonoj logas,  
 sunojn, astrojn puŝas ĝi.  
 Sferojn forajn ĝi apogas  
 en senfina galaksi'.

...

Ĥoro:

Ĥiu sub ĉielo glata  
 donu sin al simpati',  
 al la steloj gvidas ĝi,  
 kie tronas Nekonata.

Ĥiu sur la bust' Natura  
 suĉas sukcon de la ĝoj'  
 kor' malbona, koro pura  
 sekvas ŝin laŭ roza voj'.  
 Ŝi vinberojn, kisojn donas  
 kaj amikon sen pridub',  
 en volupt' la vermo dronas,  
 vidas Dion la kerub'.

Ĥoro:

Ĥu genuas vi, milmiloj?  
 Vi kreinton sentas, mond' ?  
 Serĉu super stela rond',  
 loĝas Li trans astro-briloj!

En eterno de l' Naturo  
 Ĝojo estas la risort'.  
 En la mondhorlog' por kuro  
 radojn pelas ŝia fort'.  
 Ŝi el ĝerموj logas berojn,  
 sunojn regas ŝia gvid'  
 Ŝi tra l' spaco rulas sferojn  
 trans la astronoma vid'.

...

.....  
 .....  
 .....  
 .....

Ĥoro:  
 Kiel sur la pompaj vojoj  
 sunoj sur la firmament',  
 gaje marŝu, frata gent',  
 kiel venki la herooj!

.....  
 .....  
 .....  
 .....  
 .....

Esploriston ŝi alridas  
 el la fajrspegul' de l' Ver',  
 sur krutaĵ' de l' Virto gvidas  
 ŝi la homon de toler',  
 sur Kred-Monto sunobrila  
 flirtas ŝia flag' el or',  
 ŝin tra l' fendo ĉerk-kovrila  
 vidas ni en anĝel-ĥor'.

.....  
 .....  
 .....  
 .....

Ĥoro:  
 Ho toleron, paciencon,  
 fratoj, por pli bona mond'!  
 Donos super stela rond'  
 granda Dio rekompencan!

.....  
 .....  
 .....  
 .....  
 .....

Ĉu pripagi diojn? Vanto!  
 Ĉu simili? Bela pen'!  
 Venu ĝoji kun ĝojanto  
 la mizero, la ĉagren'.  
 Venĝ'? Kolerero? En forgeson!  
 Jen pardon' al malamik'!  
 Liaj larmoj havu ĉeson,  
 lin ne boru pento-pik'.

...

...

.....  
 .....  
 .....  
 .....

Ĥoro:  
 En ŝuldlibroj plu nenio!  
 Mondon regu harmoni'!  
 Fratoj! Kiel juĝis vi,  
 tiel juĝos pri vi Dio!

.....  
 .....  
 .....  
 .....  
 .....

Ĥojo ŝaŭmas en pokaloj,  
 en orsango de l' vinber',  
 mildon trinkas kanibaloj,  
 heroecon malesper'.  
 Se rondiras la botelo,  
 fratoj, saltu el la sid',  
 ŝprucu ŝaŭmo al ĉielo:  
 Jen ĉi glas', por Bon-Spirit'!

.....  
 .....  
 .....  
 .....

Ĥoro:  
 Himnas Lin abismo stela,  
 serafar' kun glora cit'.  
 Jen ĉi glas' por Bon-Spirit',  
 supre, trans la tend' ĉiela!

.....  
 .....  
 .....  
 .....  
 .....

En suferoj: firma forto,  
 al senhelpaj: ŝirma Brust',  
 eternec' al ĵura vorto,  
 eĉ al malamiko: just'.  
 Virfiero kontraŭ tronoj,  
 kvankam sangon kostu spit',  
 al merito estu kronoj,  
 kaj perejo al insid'!

...

...

.....  
 .....  
 .....  
 .....  
 .....

*Traduko de la Germana poemo "An die Freude" de FRIEDRICH SCHILLER (Frederiko Ŝilero, \*1759 – †1805) en Esperanton de JOACHIM GIESSNER (\*1913-12-23 – †2003-11-25).*

*Arg-133-889 (2008-02-27 19:35:47)*

Ĥoro:  
 Fermu vin en sankta rondo,  
 Ĥuru do kun glaso-lev',  
 pri l' fidelo al la Dev',  
 je l' Reganto de l' Stel-Mondo!

*Traduko de la Germana poemo "An die Freude" de FRIEDRICH SCHILLER (Frederiko Ŝilero, \*1759 – †1805) en Esperanton de KÁLMÁN KALOCSAY (Kalmano Kaloĉajo, \*1911 – †1976) en 1958.*

*Arg-133-263 (2004-01-16 21:13:09)*